



# PENSEO

*N-ro 305*

*mar. / 2017*

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 28-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Anteo (Ĉinujo)



### forgeriesado

memoro estas obstina herbo;  
ĝi kreskas spite al frido, aĝo...  
razilo zuma distranĉas tempon.  
radikon bridi ne povas kaĝo.

2013.10.29

### meritoj

imperiestroj lasas ministrojn  
fari kozojn aŭkciotajn el iliaj luksoj kaj  
kadavroj.  
homoj enĥataj mem enterigas  
siajn mensojn por ke posteuloj sin  
varmigu dum palavroj.

2013.10.26

### en luksa kafejo

ino kun kapuĉo trinkas kapuĉinon —  
memorigas min pri fungoj en nebulo.  
iam povra mi en matenoj printempaj  
piednude serĉis ilin por panbulo.



2013.10.26

## de ĉielo al tero

milde mi pafis per imago akvon  
al satelito ĉirkaŭ mia kapo.  
neatendite tigrino trafita  
estas graveda kato sur kanapo.

2013.10.26

## Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



### Mondo

La granda historiisto  
Eric Hobsbawm  
registris, inter aliaj,  
l' Eraon de l' Revolucioj  
l' Eraon de l' Imperioj ...

La mondo nun atingas  
l' Eraon de l' Skandaloj  
ĉiutagaj, meze al tribaj  
muroj el frenezo, egoismo,  
kaj barbareco.

Urĝas nutri la bestojn  
de la granda cirko  
de l' sociaj retoj:  
jen morto  
de l' humaneco  
homa.



Juiz de Fora, 04/02/2017.

# Foresto

En la haŭtosilento  
krias la foresto  
de l' freŝeco de l' tempo.

Paradas jardekoj  
tra l' dezerta lunlumo,  
kiu penetras nun  
la ĉambrojn malplenajn.

Senmovaj seĝoj  
de l' manĝoĉambro.  
Tute senutilaj!

Nur piedoj  
la vivon trenas,  
kaj la doloron  
de la horoj,  
kiuj ne pasas.

Juiz de Fora, 14/02/2017.

## Paŭlo Silas (Brazilo)




# NI FARIĜIS IA DUM VELKIS LA NUBOMOVOJ

Trabori la monton per trompo blanka.  
Malsuprendirekti flugilhavajn kordezirojn.  
Sarkasme ridegi pro dolor' en torturiloj.  
Gustumi volonte la galon ankaŭ.


Maltimi perceptojn de Adam-nudecaj pekoj,  
Babili sub mondfinaj nigraj ombroj,  
Trompiĝi per samaj antaŭaj trompoj  
Kaj agi sincere laŭ demagogi-prelegoj.

Ho, voj' senskrupula, krabeca iro!  
Konscienciproĉo, kies bazoj estas sekvoj,  
Ĉu celo pravigas ĉispecan ilon?

Ŝancelon ne vidis mi sur la vibrantaj nervoj.  
Ĉe fino, komencon katastrofan mi rigardis.  
Eliru ni nun el sub ŝirmej' por kunaplaŭdi.



## Paulo Nascentes (Brazilo)



# KUZO KAJ KUZINO

1

dezirojn kiu forigas ĉu kuzo kuzino?  
deziro de gekuzoj sin esprimu – aŭ ne rimu.  
deziro de gekuzoj – familio gape ĝin forigu!  
etere gestas esto-partiklo: ne min punu!

2

ĉu tial tioma streĉo kaj perfido?  
malnecesas kiu min punu: mia rimo mia spir'  
poezias mia esto:  
idas mi el kuzokuŝanta kuzin':  
kaj mi mem kia restas?

3

per tono kaj naturdoto kvietiĝas mia anim'  
agordas min – min moderigas  
Silento rimas kun Dia: malakcepto familia?  
tim'?' sekret'?' frenezaj'?'  
gepatroj – panjo nur knabin', paĉjo ankoraŭ  
knab'  
ĉu panjo lulas min? min forpelas? knabece  
ludas paĉjo?  
Este sentemp-space jen nun mi  
atentoplene meditas:  
metafizika ekvido min memoras: ne plu kuzo,  
kuzin',  
sed Tria Inkluzivita: amiko, rigardu min.

## Siv Burell (Svedujo)



### Manĝu utilajn manĝaĵojn

Brasiko bona estas,  
se freŝe ĝi aspektas.  
Antioksidantoj en la ruĝa vin'  
vigligas nin,  
sed ankaŭ malbonaj kemikaĵoj.

Linsemoj bonas en pano,  
sed nur nepistitaj.  
Vitaminoj ĉiam trovitaj  
en fruktoj kaj beroj,  
sed nur zorge lavitaj  
vi manĝu ilin!

Mielo estas grandfortiga  
por Bamse, la urso.  
Sed por ni mielo malboniga  
por la dentoj estas.  
Kia dolĉaĵo por ni do restas?

Manĝi ni devas por ne morti.  
"Manĝas ni, sed tamen ni mortas",  
ni diris nin defendante,  
kiam gepatroj trudis nin, pensante  
ke engluti manĝaĵon al infanoj decas.



*ilustraĵo de la aŭtoro*

## Takashi Ito (Japanujo)




### larmo je vango ...

morto kaj vivo  
reciproke kruciĝas ...  
ho! vintra suno

apokalipso!...  
vintra pino trapikas  
la blankan lunon

ĉina cidonio...  
lumo kaj mallumo en  
putranta frukto

larmo je vango  
milda sumo-luktisto  
ho, nova jaro



*ilustraĵo de la aŭtoro*

## Ivanichka Madgharova (Bulgario)



Printempa pluvo  
malsekigis ŝafarojn.  
Nudpieda infan'.

Vesperiĝas. Kaj  
ankaŭ ĉi tago mortas.  
Torento gluglas.

Grincas glacio.  
Ruĝiĝas infanvangoj.  
Kristnaska dolĉaĵ'.

Pluvetas. Hundo  
sub juglandarb' dormetas.  
Estingiĝas tag'.



*el poemaro Araneaĵo*

## Gajo (Ĉinujo)



### NASKIĜVILAĜO

1.  
Songe en hejmlok',  
dometo jam kadukas,  
ĉie trudherboj!
2.  
Ĉirkaŭ la kaban'  
staras montoj kun arboj  
kaj kun arbustoj.
3.  
Ĉi naskiĝloko,  
kie mi petolemis, —  
mia kornesto!

## Henriko Heine (1797-1856)



### La sklavoŝipo

1

La kargkomercist' Mynheer van Koek<sup>1</sup>  
sidante kunnombas kajute,  
kalkulas kaj pri la kargvalor'  
kaj pri l' profito entute.

„Bonegas la pipro, bonegas la gum',  
amason da ili mi havas.  
Enŝipas oro, eburo eĉ —  
la nigra varo pli gravas.

Sescent negrojn, ridindis la prez',  
mi prenis al mi Senegale.  
Pro l' firma karn', kaj ĉiu tenden'  
elastis kvazaŭ ŝtale.

Mi donis en la interŝanĝ'  
ŝtalaĵojn, bidojn kaj brandon.

Okcentprocentos tial la gajn',  
se vidos nur tricent la strandon.

Restos de l' negroj duono nur  
havene de Rio-Janeiro<sup>2</sup>,  
pagos po cent dukatojn al mi  
l' firmao Gonzales Perreiro.“

Pro interromp' Mynheer van Koek  
nun haltas pri sia fervoro,  
la ŝipkuracist' envenas al li,  
van Smissen, la doktoro.

Li estas skelete svelta figur' —  
verukoj surnazas araj.  
„Nu, marokirurg, ekkrias van Koek,  
ĉu sanas la negroj karaj?“

„Jen mian dankon“, diris la doktor',  
„mi venis, ĉar mi informas,  
ke lastanokte la mortec'  
progresis kaj enormas.

Po tag' ĝis nun nur mortis du,  
hodiaŭ sep formortis.  
Kvar viroj, tri inoj – mi tuj sen hezit'  
la perdon ŝiplibre raportis.

Mi zorge kontrolis je ĉiu mortint',  
ĉar tiu ruza aro  
per ŝajna mort' forŝtelas sin  
ĵetite al la maro.

De ĉiu mi prenis la ĉenojn for  
kaj kiel kutime plue,  
mi lasis ĵeti ilin de l' ŝip'  
jam enmatene frue.

Elsagis jen baldaŭ el la ondar'  
la ŝarkoj, grandaj kvantoj.  
Ŝatantoj estas pri negrokarn',  
de mi estas pensiantoj.

La ŝarkoj sekvis nin sur la voj'

de l' ŝipo ekde la bordo.  
La fiaj bestoj elflaras ja tuj  
kadavrojn por grasa mordas.

Komikas tiom la observ',  
se ŝarkoj kadavrojn mordas!  
Jen kapt' je kap' jen kapt' al krur'.  
La rest' intestojn distordas.

Vorinte ĉion, petolas la ar'  
kontente la ŝipoflankojn,  
gapante al mi, kaj ŝajnas eĉ,  
volonte dirus eĉ dankojn.“

Ĝemante interrompas lin  
van Koek : „Kiel mi povos  
malhelpi, ke kreskos plu tiu plag' ?  
Ĉu sin rimedo trovos?“

Van Smissen rediras : „Pro propra kulp'  
tre multaj negroj jam mortas.  
Elspiroj de l' negroj en la hold'  
haladzojn ŝipfunden portas.

Kaj kelkaj mortis pro melankoli';  
mortigas la troa enuo.  
Sanigos ilin do aer',  
muzik' kaj dancoĝuo.“

Jen vokas Koek : „Brila konsil'!  
Vi saĝas eĉ pli, doktoro,  
ol iam la Aristotel':  
de l' granda grek' la mentoro.

La prezidant' de la societ'  
en Delft por la greft' de l' tulipo  
prudentas tre, sed estas li  
rilate al vi nur ŝtupo.

Muzik'! Muzik'! La negroj do  
ekdancu ferdeke de l' ŝipo.  
Se iu jam satas pri la amuz',  
li hope saltu per vipo.“

2

De l' alt' el blua firmament'  
rigardas stelomiloj  
sopire lumas kaj kun saĝ',  
kun inaj okulaj briloj.

La steloj rigardas al la mar'.  
Jen kuŝas vastaj rondoj  
en fosforeska purpurfarb';  
Volupte kveras la ondoj.

Ne flirtas veloj sur l' sklavoŝip'  
Laŭ ŝajn' sen rig', surmara.  
Lanternoj briletas sur la ferdek'  
ĉe dancmuzik' barbara.

Stiristo violonas nun,  
kaj flutas kuiristo,  
ŝipbubo batas sur la tambur',  
trumpetas la kuracisto.

La inoj, viroj, ŝajnas eĉ cent,  
jubile saltante baraktas  
freneze eĉ, ĉe ĉiu salt'  
la feroj tinte laŭtaktas.

Sovaĝe surstamfas la plankojn la ar'  
kaj kelkaj negrulinoj  
sin kroĉas volupte al nuda amik'—  
eksonas ĝemaj kulminoj.

Gardist', la Maitre des plaisirs<sup>3</sup>,  
per vip' stimule pelis  
dancistojn pigrajn al gajec',  
ke ili ĝoju, celis.

Kaj violonad'! Kriad' kaj ĉin bum!  
La bru' el la profundo  
logas monstrojn de l'akva mond'  
el stulta dorm' sur grundo.

Centoble ŝarkoj alnaĝas pro ĝi,  
dormeme ili venas;  
kaj gapas al la ŝipferdek',

perpleksas, ne komprenas.

Ne venis jam la matenmanĝ',  
oscedaj ŝarkoj, ĝin sentas,  
malfermas la faŭkojn, makzeloj jen  
dum montroj segodontas.

Kaj violonad'! Kriad' kaj ĉin bum!  
ne haltas la dancoj pluire.  
La ŝarkoj primordas sen pacienc'  
la proprajn vostojn ŝire.

Mi pensas, ne plaĉas ŝarkojn muzik'  
laŭ multaj el tia ĉi bando.“  
Ne fidu bruton sen am' pri  
muzik'! Jen Shakespeare el Britlando.

Kaj violonad'! Kriad' kaj ĉin bum!  
Ne haltas la dancoj pluire.  
Ĉe l' antaŭmast' Mynheer van Koek  
manpreme preĝas suspire:

„Je Kristo, lasu plu vivi por mi  
la nigrajn pekintojn, Dio!  
Se l' stultaj bovoj incitis vin,  
vi scias ja bone pro kio.

La vivon do lasu, pro nia Krist'  
mortinta por la homaro!  
Se restos malpli ol tricent nur,  
mi ne profitos de l' varo.“

*el „Das Sklavenschiff“, H.Heine: Alle Werke, Band I,  
Seite 258*

*Sklavoj - memormonumento en Sanzibaro*

*La sklavigo de la negroj, malpermesita en la britaj  
kolonioj en 1833, en la francaj en 1848, estis  
malpermesita de Usono nur en la jaro 1865, de  
Brazilo en la jaro 1871, kvankam ilia transportado el  
Afriko estis jam formale malpermesita en la jaro  
1826.*

1. „Mynheer van Koek“ (prononcu: majnhe:r!  
vankuk), ŝerca nomo, kiu signifas 'Sinjoro Kuko'.  
2. Rio Janeiro: Rio de Janeiro, iama ĉefurbo de  
Brazilo.

3. *Maitre des plaisirs* (pr. metre deplezir!): aranĝanto  
kortegaj baloj kaj baletoj.

*Esperantigis*



**Cezar (Germanio)**

**Zhuangzi (369-286 a.K)**



**Zhuangzi**

**ĈAPITRO DEKA**

**Malfermo de kesteto**

**§10-01**

Por antaŭgardi kontraŭ ŝtelistoj, kiuj povus malfermi la kestojn, palpe serĉi en la sakoj kaj perforte rompi la ŝrankojn, certe oni firme ligas la kestojn kaj sakojn per ŝnuroj kaj ŝlosas la ŝrankojn per solidaj seruroj. Tio estas la ordinare nomata “saĝa singardo”. Sed, kiam rabisto venos, li forkuros portante sur la dorso aŭ la ŝultro la keston, sakon aŭ la ŝrankon. Tiam lia nura timo estos, ke ĝi ne estus ligita sufiĉe firme, nek ŝlosita sufiĉe solide. Tiokaze tio, kio estas nomata la “saĝa singardo”, servos nur al la rabisto.

Nun, ni do provu diskuti pri la demando: ĉu tio, kio estas la ordinare nomata “saĝeco” ne povas servi al la granda rabisto? Ĉu do tiu, kiu estas la ordinare nomata “saĝulo”, ne povas esti nur gardisto por la rabistoj? Kiel do ni scias, ke tiel estas?

En la pasinteco la regno Qi havis tiom multe da urboj kaj urbetoj, ke iliaj loĝantoj povis esti vidataj unuj de la aliaj, kaj la krioj de iliaj kokoj kaj la bojoj de iliaj hundoj povis

esti aŭdataj de ili reciproke. Ĝia teritorio etendiĝis ĉirkaŭen je du mil lioj. Sur ĝi la retoj estis sternitaj por kapti birdojn kaj fiŝojn kaj la tero estis plugita por kreskigi grenplantojn. Prapatraj temploj kaj altaroj al la terdioj kaj grendioj estis konstruitaj ĉie en la lando. La regado de la urboj kaj la kamparo ĉiam sekvas la instrukciojn de la saĝuloj. Kaj tamen, kiam Tian Chengzi mortigis la princon Qi kaj uzurpis la regnon, ĉu oni povus diri, ke tio, kio estis uzurpita de li, estis nur la regno? Li uzurpis ja ankaŭ la leĝojn faritajn de la saĝuloj kaj eĉ ties “saĝeco”. Rezulte de tio Tian Chengzi ricevis la nomon de ŝtelisto kaj rabisto, sed li vivis tiel trankvile kaj sekure, kiel la reĝoj Yao kaj Shun. La malgrandaj regnoj ne kuraĝis riproĉi lian kulpon, dum la grandaj regnoj ne kuraĝis lin ataki. La regno Qi estis firme tenata en la manoj de li kaj liaj posteuloj dum dek du generacioj. Ĉu do ne estis vere, ke li uzurpis la regnon Qi kaj samtempe utiligis la leĝojn faritajn de la saĝuloj kaj ties “saĝecon” por protekti sian vivon kiel ŝtelisto kaj rabisto?

Ni do provu plu diskuti. Ĉu tio, kio estas la ordinare nomata “saĝeco” ne povas servi al la granda rabisto? Ĉu do tiu, kiu estas la ordinare nomata “saĝulo”, ne povas esti nur gardisto por la rabistoj? Kaj kiel do ni scias, ke tiel estas?

En la pasinteco Guan Longfeng estis senkapigita; Bi Gan havis sian koron elpikita; Chang Hong estis disŝirita per ĉaroj; kaj Wu Zixu estis dronigita kaj lasita putri en rivero. Tiuj ĉi kvar personoj ja estis grandaj induloj, sed ili ne povis eviti esti ekzekutitaj laŭ la leĝoj faritaj de la saĝuloj.

Tial, kiam unu el la disĉiploj de la rabisto Zhi demandis al tiu: “Ĉu ankaŭ ni rabistoj havas nian metodon aŭ principon?”

“Kiel do ni povas nehavi la nian?” respondis Zhi. “Diveni, kia trezoro troviĝas en la domo, estas por ni sagaceco; esti la unua perforte eniri en domon estas kuraĝo; esti la

lasta eliri el la domo estas justeco; kapabli decidi, ĉu la rabado estos farebla, estas saĝeco; egale dividi la rabaĵojn estas humaneco. Ekzistas neniu granda rabisto en la mondo, kiu ne estus dotita per tiuj ĉi kvin kvalitoj.”

Se ni rigardas aferojn ĉe tiu ĉi lumo, ni konstatas: kiel la bona homo ne povas fariĝi honesta sen sekvi la leĝojn faritajn de la saĝuloj, tiel la rabisto ne povas fariĝi tia, kia estis Zhi, la granda rabisto, sen sekvi la samajn leĝojn; kaj kiel en la mondo bonaj homoj estas malpli multaj, ol malbonaj, tiel la saĝuloj faras malpli da utiloj, ol malutilojn. Tial ni havas la popoldirojn, kiuj montras la rilaton inter la kaŭzo kaj la rezulto: “se la lipoj forestus, la dentoj elmetiĝus al la malvarmo”; “la maldelikata vino donacita de Lu estis la kaŭzo de la sieĝo al Handan”; “la apero de la saĝulo kuntrenas tiun de la rabisto”; “la mondo retrovos bonan ordon nur tiam, kiam la saĝuloj estos faligitaj kaj la rabistoj kaj la ŝtelistoj estos liberigitaj”.

Kiam la riveroj sekiĝos, la valoj malpleniĝos; kiam la montetoj ebeniĝos, la abismoj pleniĝos. Kiam la saĝuloj mortos, la rabistoj ne aperos kaj la paco regos en la mondo.

Se la saĝuloj ne mortas, la rabistoj ne malaperas. Ju pli gravaj lokoj estas konfidataj al la saĝuloj, des pli da profitoj estas akiritaj de la rabistoj. Kiam grenmezuriloj estas elfaritaj, la ŝtelistoj ilin ŝtelas; kiam pesiloj estas elfaritaj, la ŝtelistoj same ilin ŝtelas; kiam sigeliloj estas elfaritaj por konfirmi la aŭtentikecon, la ŝtelistoj ankaŭ ilin ŝtelas; kiam la humaneco kaj la justeco estas elpensitaj por korekti la malbonojn de la mondo, la ŝtelistoj eĉ ilin ŝtelas!

Kiel do ni scias, ke tiel estas? Tiu, kiu ŝtelas zonobukon, estas damnita al morto, dum tiu, kiu ŝtelas ŝtaton, fariĝas feŭda sinjoro. Nun la humaneco kaj la justeco estas observataj en la domo de la feŭda sinjoro, — ĉu do tio ne pruvas, ke la humaneco, la justeco

kaj la saĝeco ĉiuj estas ŝtelitaj? Tial tiuj, kiuj sekvas la rabistojn kaj tiel fariĝas feŭdaj sinjoroj, kaj tiuj, kiuj ŝtelas kiel la humanecon kaj la justecon, tiel ankaŭ la grenmezurilojn, pesilojn kaj sigelilojn, neniel povas esti deadmonitaj for de siaj agoj kun la rekompenco de kaleŝoj kaj kronoj, nek esti detenitaj eĉ kun la minaco de ekzekuto per hakilo. Ju pli multe ili akiras, des pli malfacile estas ilin reteni. Jen estas la kulpo de la saĝuloj.

Tial oni diras: “Kiel la fiŝo ne devas forlasi la akvon profundan, tiel la efikaj armiloj de la regno ne devas esti montritaj al la homoj.”

Tiuj saĝuloj, kiuj estas la efikaj armiloj en nia mondo, ne devas esti metitaj en lumon al la mondo. Tial, forĵetu la saĝulojn kaj la saĝecon, kaj la grandaj rabistoj estos detenitaj; frakasu la jadojn kaj la perlojn, kaj la malgrandaj rabistoj ne aperos; rompu la sigelilojn, kaj la popolo refariĝos simpla kaj honesta; detruu la grenmezurilojn kaj pesilojn, kaj la popolo ne plu kverelos; abolu ĉiujn leĝojn, kiuj estas faritaj de la saĝuloj, kaj la popolo refariĝos prudenta.

Detruu la ses muzikajn tubojn, rompu la flutojn kaj la kordinstrumentojn, ŝtopu la orelojn de Shi Kuang la fama muzikisto, kaj la popolo en la mondo konservos sian denaskan aŭdsenson. Forviŝu la buntkolorajn desegnaĵojn, dispersu la kvin bazajn kolorojn, gluu la okulojn de Li Zhu la homo plej akrevida, kaj la popolo en la mondo konservos sian denaskan vidsenson. Rompu la kurbilojn kaj rektoŝnurojn, forĵetu la cirkelojn kaj ortilojn, frakasu la fingrojn de Chui la lerta metiisto, kaj la popolo en la mondo konservos sian denaskan lertecon. Jen kial oni diras: “La granda lerteco ŝajnas mallerta.”

Bridu la agojn de Zeng Can kaj Shi Qiu, sigelu la lipojn de Yang Zhu kaj Mo Di, forĵetu la humanecon kaj la justecon, kaj la virtoj en la mondo povos kunfandiĝi en Unu.

Se ĉiu konservos sian denaskan akran vidadon, tiam la mondo ne estos detruita; se la popolo konservos sian denaskan akran aŭdadon, la mondo ne estos ĝenata de bruado; se la popolo konservos sian denaskan saĝecon, la mondo ne estos konfuzita; se la popolo konservos sian denaskan virton, la mondo ne estos perversigita. Unuvorte, Zeng Can, Shi Qiu, Yang Zhu, Mo Di, Shi Kuang, la metiisto Chui, Li Zhu, ĉiuj starigis siajn virtojn ekster si kaj nur semis konfuzon kaj malordon en la mondon. Estas tute senutile sekvi ilin kiel modelojn!

*Elĉinigiŝ*



**Wang Chongfang**

(Ĉinujo)

**Ĉineske**

**Veĵdo (Ĉinujo)**



**Sorĉa povo kontraŭ pluvo**

*el rakontoj pri Afanti*

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

La reĝo  
iris ĝojplene  
ĉasi kun korteganoj  
dum Afanti ĉagrene  
sekvis sintrene,

ĉar ili  
rajdis impone  
sur kurĉevaloj kaj li  
sur poneo dispone  
jen laŭordone.

Dumvoje  
tondris subite,



fulmadis kaj pluvegis,  
 ĉiuj ja surprizite  
 fuĝis evite.

Kaj ili  
 galopis grege  
 en urbon por ŝirmi sin  
 sed en vestar' malseka  
 pro bat' pluvega.

Afanti  
 pro fi-ĉevalo  
 ne povis rapidi sed  
 nur haltis dum pluvfalo  
 ĝis la finalo.

Li saltis  
 de ĝi rapide  
 kaj demetis la veston  
 kaj ĝin ŝovis konfide  
 sub selon glite.

Post pluvo  
 aperis suno.  
 Li surmetis la veston  
 kaj rajdis kun kant-zumo  
 en plena juno.

Kiam li  
 palacon iris,  
 jen la reĝo vidis lin  
 en seka vest' kaj miris,  
 "Kiel akiris

sekecon  
 vi en pluv-kovro,  
 dum ni tramalsekiĝis?  
 Ĉu estas sorĉa povo  
 en via movo?"

Afanti  
 diris ridete:  
 "Ne, via reĝa moŝto,  
 kiam vi fuĝis cede,

pluvo obsede

vin sekvis,  
 dum al ĝardeno  
 bela mia ĉevalo  
 min kondukis sen peno  
 kaj ajna ĝeno.

Jen tie  
 brilas la suno,  
 pompas floroj kaj birdoj  
 kantas en arb-brakumo,  
 lirlas roj-rumo.

Ĝi estas  
 jen en la mondo  
 la plej bela ĝardeno,  
 al mi plaĉis la montoj  
 kaj klaraj ondoj.

Pro tio  
 iom malfrue  
 mi revenis al palac',  
 staras ĉe vi genue  
 kun tim' senbrue."

La reĝo  
 gapis kun envi'  
 tre deziris iri al  
 loko plena de magi'  
 kaj, ha, fantazi'.

Jen ili  
 en la dua tag'  
 iris ĉasi denove.  
 Ilin trafis pluv-atak'  
 dum ilia vag'.

Ĉifoje  
 Afanti rajdis  
 sur reĝa ĉevalo sed  
 tiu poneon ŝatis  
 kaj vipe batis.

Ĉe ekpluv'  
Afanti donis  
vipadon al ĉevalo,  
ĝin galopi ordonis  
kaj plue spronis.

Apenaŭ  
pluvguto eta  
lin kaptis post reveno  
per kurĉeval' impeta  
kaj longpieda.

Sed tamen  
la stulta pone'  
haltis pro tim' al tondro,  
rifuzis rapidi tre  
dum pluva akme'.

En pluvad'  
la reĝ' mizere  
tramalsekiĝis ĝis haŭt',  
embarasiĝis vere  
veis suferi.

Vidinte  
Afanti-n, brule  
de kolero la reĝo  
muĝis: "Vi senskrupule  
trompis min mule!"



Afanti  
diris ridete:  
"Se sub selon vi metus  
la vestojn, vi tutcerte  
povus complete

reveni  
seka tuttute

kaj ne viaj vestaĵoj  
malsekiĝis pluv-gute  
ja absolute!"

*\*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

## Mandio (Ĉinujo)

# Februaro

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo\*

Ĉi  
momente glimas radi'  
printempa  
el vintra ebri'.

En  
frosta vento en ĝarden'  
verdeco  
ekŝosas sen ĝen'.

Neĝ'  
kvankam restas sur monteĝ',  
alvenas  
jam la varm-sieĝ'.

Ĝoj'  
lirlas glitante en roj',  
dancante  
salte kun orgojl'.

Am'  
fermentas en koro jam,  
ŝi kaj mi  
nin banas en flam'.

*\*Dekses-Silabo: ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

## Adil Olluri



# La Foiro de la songoj

En la nia malgranda vilaĝo, el plej malgrandaj viditaj de mi iamfoje, ĉiun jaron venadis neordinaraj vendistoj el la diversaj landoj de la globo. Ili apenaŭ vendadis en iu alia loko, krom nian vilaĝon, etendiĝita ĉe la piedoj de monteto, inter la plej malgrandaj, videblaj de la homa okulo. Ĉi tiu okulo neniel povas vidi ion majestan en ĉi tiu vilaĝo, krom la surterajn domojn kaj malvastajn stratojn, kvazaŭ porkapraj, kie apenaŭ du virkapoj povus pasi, se ili irus flankflanke. Tie, ne nur la domoj kaj la stratoj, sed ankaŭ la homoj estas malgrandaj, kaj la plej altstatura el ni estas ja Sali, kiu defias mian 190 cm per dek da centimetroj pli.

Eble, mi jam diris vin ke ĉi tiu vilaĝo kun siaj homoj, estis, ni diru tute forgesita eĉ de Dio mem, forlasita ĉe tiu abisma rando de la lando, kie nur rarulo, kaj fojfoje neniu, eniris, krom la vendistoj kiuj ne similis unu al la alia.

Ili vendadis sonĝojn, neordinaran varon, kiu apenaŭ vendiĝas en iu alia lando, krom ĉe ni. Neordinaraj vendistoj venadis kutime ĉiujare, en la sama tempo, je sama semajntago, je la sesa tago de la sesa jarmonato kaj komencis sian laboron je la sesa horo de la mateno, kaj laŭ iliaj statistikoj, dum la ses laborjaroj, ili estis vendintaj sescent sesdek sonĝojn. Ilian merkaton ili nomis foiro, vorto ne aŭdita antaŭe en la nia vilaĝo.

Estis diversaj sonĝoj en ĉi tiu foiro, el plej malmultekostaj ĝis tiujn plej multekostaj, kiuj, se oni aĉetus laŭvole, post iom da tempo realiĝis.

Nur malmulte da tiaj sonĝoj, tre malmulte, estiĝis, sed la aĉetintoj rajtis ilin anstataŭi per aliaj sonĝoj, ĉar la fremdaj vendistoj respektis laborkriterion por ne redoni la monon, tial la vilaĝanoj obeis al ili. Niaj homoj aĉetadis sonĝojn el plej strangaj ĝis tiuj, kiujn oni apenaŭ indus mencii. Ili aĉetis sonĝojn koncernantaj sin mem sed ankaŭ la alies vivon. Ili revis pri sia amo, sed ankaŭ pri la rompiĝo

de la alies amo, revis pri sia riĉaĵo, sed ankaŭ pri la pereigo de la alies riĉaĵo.

Mi memoras ke Selim, antaŭ kelkaj jaroj, aĉetis sonĝon por divorcigi Arsim kun Besarta kaj post sed monatoj, la geparo disiĝis, kaj la sama Selim, post unu jaro, aĉetis la sonĝon por proprietiigi al si tiun virinon, kio ja realiĝis. Simile, mi memoras ke Hamdi aĉetis sonĝon laŭ kiu la riĉaĵo de Fazli ne plu kresku kaj ekde tiu tago ĉi lasta apenaŭ prosperis en sia metio.

La sonĝoj pri la aliuloj kostis pli malkare kaj niaj vilaĝanoj, estante malriĉaj, aĉetadis ilin pli ofte. Kaj, iamtage, kiam proksimiĝis la denova alveno de la vendistoj en sia kutima tempo, la vilaĝanoj enzorgiĝis pro tio, kiajn sonĝojn ili devus aĉeti ĉijare, ĉar multaj esprimataj sonĝoj, aŭ eĉ enfermitaj en ilia animo, estis jam aĉetintaj de ili.

Kion ni aĉetu, kio plurestis ankoraŭ ne realigita; ĉu ni aĉetu, aŭ ne, ĉi jare...!? Jen iliaj maltrankvilaĵoj, kiuj lasis ilin senmanĝe kaj sendorme, ĉar ili ne povis solvi tiun dilemon. Tia maltrankvilaĵo "aĉeti, aŭ ne aĉeti" ne malŝparis eĉ min, nek du miajn plej bonajn amikojn, Ali kaj Sali.

Tutan tagon nin elokupis la pensoj pri tio, kion ni faru, ĝiskiam Sali, kiu estis je dek centimetroj pli alta ol mi, decidis alparoli min.

— Ĉu ni aĉetu sonĝon kiu apartenus al ni ĉiuj kaj samtempe al ĉiu el ni aparte?!

— Kiel tio eblus? -demandis mi heziteme.

— Nu, kiel mi diru...Ŝajnas kvazaŭ...

— Diru do, kiel? - insistis Ali

— Ni demandu ke oni vendu al ni sonĝon, laŭ kiu niaj korpoj pligrandiĝos.

— Oouuuu! — ekmiris Ali

— Jam sufiĉe longe ni estas vivintaj malgrandkorpulaj. Ni ne devas esti alie ol la ceteraj homoj, kiam ni povas estis ja same kiel ili. Hodiaŭ ekzistas ebleco por tio. Nun, aŭ neniam! - diris Sali kun tono ribelema, kiun mi neniam antaŭe estis aŭskultinta.

